

Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo en Soveta Unio,
laŭ la historiaj studoj de Ulrich Lins, 3-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 605, 1975.05.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Nin bazante sur la historiaj priskriboj de Ulrich Lins, ni prezentas al vi raporteton pri la persekutoj kontraŭ la esperanto-movado fare de la stalinismo. Vi aŭdas la trian prelegon pri tiu temo.

A.- Ni jam raportis, ke post la Oktobra Revolucio kaj ĝis 1935 la organizaĵo Sovet-respublikara Esperantista Unio (SEU), fondita en 1921, ĝuis oficialan apogon. Ĝus antaŭ la persekutoj ĝi havis pli ol 15'000 membrojn. La ĉefa aktiveco, per kiu SEU vivtenis sin, estis la perado kaj kontrolado de korespondado inter sovetaĵ kaj alilandaj esperantistaj proletoj. Kelkaj sovetaĵ esperantistoj ne timis tute senkaŝe skribi pri la stalinismaj ekscesoj al siaj korespondantoj en eksterlando. Kiam tiaj sciigoj atingis eksterlandajn konvinkitajn komunistojn, tiuj ĉi, opiniante, ke tiele nur povas skribi *kontraŭ-revoluciulo*, resendis la koncernan leteron *informcele* al SEU aŭ eĉ al la ŝtata soveta polico. Ĝuste tiu fakto, ke Esperanto servis ne nur kiel unudirekta kanalo de informoj el Soveta Unio, sed permesis verajn personajn leter-kontaktojn, plej kredeble kaŭzis la subpremon de la esperanto-movado en la uragano de la stalina Granda Purigo.

Cl.- En unu el la kategorioj, kiujn disbati celis la Granda Purigo vastskale lanĉita en marto 1937, troviĝis la esperantistoj.

A.- Speciala departemento de la Ministerio pri Internaj Aferoj, la misfama NKVD, havis listojn, en kiuj suspektindaj personoj estis grupigitaj laŭ la jenaj kategorioj :

Cl.- Kontraŭsovetaĵ elementoj ; aktivaj membroj de eklezio ; membroj de religia sekto ; ribeluloj (ĉiuj, kiuj en pasinteco estis iel implikitaj en kontraŭsoveta agado) ; fine civitanoj kun kontaktoj al eksterlando.

A.- Ke la esperantistoj troviĝis en tiu lasta kategorio, *civitanoj kun kontaktoj al eksterlando*, supozigas la aserto de la aŭstra komunisto Alex Weissberg, viktimo de la Purigo :

Cl.- Ni citas lin : « *Estis Stalin mem, kiu donis al Jeĥov (ĉefo de NKVD) siajn instrukciojn por la Granda Purigo. Estis Stalin mem, kiu indikis la grupojn, kiujn necesas detrui.* »

A.- Pri la kvina grupo, je citaĵo : « *Ĉiuj, kiuj vivis en eksterlando kaj konis proprasperte la antaŭ-militan periodon, kaj ĉiuj, kiuj havis amikojn kaj parencojn en eksterlando kaj korespondis kun ili ; la poŝtmark-kolektantoj kaj la esperantistoj.* » (Fino de la citaĵo.)

Cl.- « *Weissberg ne indikis sian fonton, sed tre simila kategoriigo aperas en la solaj dokumentoj de NKVD, kiujn ni disponas* », skribis Ulrich Lins. « *Ili estis kaptitaj de germanaj trupoj dum la okupo de Litovio, poste falis en la manojn de usonanoj kaj estas nun konsulteblaj sur mikrofildoj en la Public Library de Novjorko. Temas pri sekretaj instrukcioj en ligo kun la anekso al USSR en 1939 de la baltaj ŝtatoj.* »

A.- Plenumante Odonon numero 001223 de NKVD de USSR de la 11-a de oktobro 1939, la Popola Komisararo pri Internaj Aferoj de Litova SSR, Guzevičius, postulis, per strikte sekreta

Ordono numero 0054 de la 28-a de novembro 1940, registri, pro la *granda infektiĝo* de Litovio per ili, ĉiujn *kontraŭsovetajn kaj socie fremdajn elementojn*. Li donis entute 14 kategoriojn.

Cl.- La kategorio **J** estas tiel priskribita. Ni citas : « *Personoj, kiuj havas personajn kontaktojn kaj korespondadon kun eksterlando, kun eksterlandaj legacioj kaj konsulejoj, esperantistoj kaj filatelistoj.* » (Fino de la citaĵo.)

A.- Tiu registrado devis esti finita sur provinca nivelo ĝis la 10-a de februaro 1941, kiel vidiĝas el instrukcio de la NKVD-ĉefo en Biržai de la 30-a de januaro, cetere relistiganta la samajn diversajn kategoriojn.

Cl.- Ulrich Lins skribas : « *Ĉar socie fremdajn elementojn ne toleratajn en la baltaj landoj oni evidente ne toleris, kaj pli frue forigis en Soveta Unio mem, la grupigo de Weissberg verŝajne posedas altgradan aŭtentikecon.* »

A.- Do nura kono de Esperanto estis kialo por esti deportita. Tre verŝajne pli ol 15'000 esperantistoj mortis en siberiaj koncentrejoj, kien ili estis ĵetitaj senprebare, sendiskute, sen ia jura bazo kaj sen la povo defendi sin kontraŭ konkretaj akuzoj. Ili troviĝis en la kategorio **J**, kun etburĝoj, kiuj korespondis kun eksterlando, kun parencoj de elmigrintoj aŭ eĉ kun ŝatantoj de tia sendanĝera hobbio, kia estas la kolektado de poŝtmarkoj.

Cl.- La grandaj cerbostreĉoj, per kiuj Drezen kaj aliaj gvidantoj de Sovetrespublikara Esperantista Unio provis meti esperanton en la servon de protela internaciismo, ne alportis al la esperantistoj ian privilegian traktadon, kiam Stalin decidis entrepreni la Grandan Purigon kontraŭ ĉiuj *malamikoj de la ŝtato*.

A.- Dum dudek jaroj aperis nenia esperanta presaĵo en Soveta Unio ; nur ekde la jaroj 1954/1955 paŝon post paŝo restariĝis la esperanto-movado. Sed ne pli frue ol en 1963, en Sofio, sekve de insista peto de la Bulgaroj, delegacio de sovetaj esperantistoj denove partoprenis internacian Esperanto-Kongreson por la unua fojo post 1931.

Cl.- Ĝis nun laŭ nia kono neniuj publika deklaro agnoskas, ke la sistema detruo de SEU kaj la persekutoj kontraŭ miloj da senkulpaj esperantistoj baziĝis sur falsaj akuzoj. La Soveta Esperanto-Movado ankoraŭ atendas rehonorigon. Kiom longe ?

A.- La venontan semajno ni raportos pri persekutoj kontraŭ esperanto okazintaj en la orient-eŭropaj ŝtatoj sub la stalina regado.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !